

Centra Organo de Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
Fondita en 1992 Landa Sekcio de TEJO

La Junuloj

10
2010

Komikso / LERNEJ' LERNEJ'

Intervjuo / Bill Mak

Prezentado de Novulo

Vendejo de Frostigitaj Manĝaĵoj de Kato

執筆紹介 - Gaja Gaja



JAĜI
LERNEJ' LERNEJ'


.....P.2

Desegni komikson fariĝis iom ĝoje por mi.



林幸子
HAJAŜI Sačiko
Vendejo
de
Frostigitaj Mangaĵoj
de
Rato

.....P.6



清水義益
SIMIZ Josijas
Intervjuo / Bill Mak

.....P.3-5

Esperanto estas trezoro de vivo.



岩間響
IWAMA Kyo

表紙写真

杉本咲
SUGIMOTO Saki
Prezentado de Novulo

.....P.5



藤森耕平
FUĴIMORI Kohej

編集

En la vasta kosmo ni ĉiam atendas vin.

会費振込

郵便振替口座 : 00140-8-755070

加入者名 : JEJ

会費 :

正会員 (35歳未満) 1500円/年

高校生まで 400円/年

新規入会者 750円/年 (初年度のみ)

賛助会員 (35歳以上) 2000円/年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtoĝira konto, Numero: 00140-8-755070

Nomo de konto: JEJ

Kotizo:

Regula membro (malpli ol 35-jaraĝa) 1500enoj/jaro

Ĝis altlernejano 400enoj/jaro

Novmembriĝinto 750enoj/jaro (nur en la unua jaro)

Subtenanto (35-jaraĝa kaj pli) 2000enoj/jaro

2009年度は活動が停滞し誠に申し訳ありませんでした。今後はこのようなことがないように、後輩の育成と正確な引き継ぎに努めて参りたいと存じます。お詫びとして対応を取らせていただきます。2009年度分をお支払いの方は2010年度分の会費を納入済みとします。2009年度分と2010年度分を続けてお支払いの方は2011年の会費を納入済みとします。

Koran pardonon pro tio ke nia agado haltis en jaro 2009. De nun ni devas kreskiĝi posteulojn kaj transpreni ĝuste. Pardonpetante ni respondas al vi jene: Oni traktas kotizon por jaro 2010 kiel pagita pri tiuj homoj kiuj jam pagis kotizon por jaro 2009.

Oni traktas kotizon por jaro 2011 kiel pagita pri tiuj homoj kiuj jam pagis kotizon por jaro 2009 kaj 2010.

電子版・音声版について

今号の電子版を公開しています。詳しくは下記JEJのウェブページをご覧ください。なお音声版は継続的に作成することが困難でしたので断念します。誠に勝手ながらご了承ください。

Pri reta kaj sona versio

Ni publikigas retan version de ĉi tiu numero. Bonvolu viziti al retejo de JEJ (skribita sube). Ni ne povas daŭre publikigi la sonan version ĉar tio estas tre malfacila laboro. Pardonu nin.

La Junuloj 2010年10月号(n-ro 88)
2010年10月1日発行
編集 藤森耕平
発行 日本青年エスペラント連絡会
〒162-0042 東京都新宿区早稲田町12-3
エスペラント会館 気付
メールアドレス
jej_kontakto@yahoogroups.jp
ウェブページ
http://www.jej.jp

La Junuloj oktobro 2010(n-ro 88)
La 1an de oktobro, 2010 eldonita.
Redakto: FUĴIMORI Kohej
Eldono: Japana Esperanto-Junularo
JP-162-0042, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku,
Tokio, Japanio
Ret-adreso:
jej_kontakto@yahoogroups.jp
TTT-ejo:
http://www.jej.jp

あなたも記事を書いてみませんか？

「La Junuloj」では皆様の投稿やご感想を募集しています。左記宛先までお送りください。次号は1月に発行します。

Jen skribu artikolon!

Ni atendas vian penson kaj kontribuon per via artikolo! Bonvolu sendi ĝin al la maldekstra adreso. La venonta numero eldoniĝos en januaro.

5



6



LERNEJO

ESPERANTO

RIDO

LIBRO

ESPERANTO

JAKO

LERNEJO

EKZAMENO

RIPOZO

NAĜEJO

EKSPERIMENTO

JUNULO

JAGI



S-ro Bill Mak parolis promenante.

Intervjuis Josi. S-ro Bill Mak prelegis sub la titolo “Ĉinio, ne konata historio inter 1946 kaj 1976” dum la 59a Esperanto-Kongreso en Kantô. Post la prelego mi intervjuis lin promenante. Li parolis pri Esperanto iom filozofie, tamen humore.

J: Saluton. Mi elkore gratulas vin pro via sukceso de via prelego. Sed unue, mi volas demandi al vi surbaze de la artikolo kiu aperis en la libro “Esperanto kaj mi” Vi skribis en ĝi, ke vi songis Esperante en unuaj tagoj de via lernado de la lingvo. Nu, ĉu vi songis en Esperanto lastatempe?

B: Jes.

J: Kian songon?

B: Kian songon? Fakte, mi eksongis Esperante, kiam mi estis ankoraŭ lernanta Esperanton. Kiam mi ekkomencis lerni la lingvon, mi havis tre fortan pasion. Mi volis posedi la lingvon. Ununokte, neatendite mi havis songon en Esperanto, kiun mi ne komprenis. Sed mi fakte sciis, ke ĝi estas Esperanto (kiel mi ne scias). Poste, mi malofte songis Esperante, sed fojfoje jes, precipe dum la IJK en Honkongo. Ĉar tiam mi estis ege streĉita, fojfoje kiel koŝmaro, koŝmara songo: Kio okazis pri la aliĝado? Kio okazis kun la mono? Tiumaniere mi songis Esperante.

J: Ĉu vi songis en aliaj lingvoj?

B: Jes.

J: Vi havas multajn kapablojn pri lingvoj, la angla, la franca ...

B: Mi sentis, ke mi ne estis tiom kapabla, se temas pri lingvoj. Tamen mi ja lernis multajn lingvojn. Ĉar tio estas mia profesia fako. Mi lernis eble entute

dudek lingvoj. Sed flue parolas nur kelkajn. Ekzemple la katonan kaj la anglan. Esperante mi pensas, ke mi povas flue paroli. Sed estas ankaŭ tiuj lingvoj kiujn mi lernis, ekzemple la korean lingvon, kiun mi lernis unu jaron, sed mi nun nur povas prononci la literojn. Mi jam forgesis preskaŭ la tuton. Aliaj lingvoj, ekzemple la sanskrito estas mia ĉef-fako, kompreneble ĝi ne estas parola lingvo. Ja mi ofte songas en diversaj lingvoj.

J: Vi menciis en via artikolo, ke vi havis malfacilaĵon pri parolado. Do, kiamaniere vi plibonigis vian paroladon de Esperanto?

B: Do, ankaŭ vi tre bone parolas! Mi pensas, ke severa instruisto estas tre grava almenaŭ je la komenco. Mi ne scias, ĉu mi jam renkontis en mia artikolo pri Zdravka Metz, la kroatino, edzino de la fama kanada Esperantisto Normand Fleury de Kebekio. Mi loĝis kun la familio eble dum tri monatoj. Kaj tiam mi pensis, ke mi jam posedis la gramatikon, sed mi ne povis paroli. Por mi lingvoj, kvankam ĝi estas mia fako, mi trovis ĝin tre malfacilan. Antaŭe mi estis ĉiam scienca studento. Kaj lingvoj tre interesis min, sed mi tute ne kapablis. Do, mi ne estas denaske talenta lingvisto. Mi tre honteme parolas. Sed Zdravka ĉiam diris al mi, kiam ajn mi petis, ke bonvole parolu pli malrapide, ŝi ĉiam respondis, bonvole aŭskultu pli rapide!

J: Vi organizis la IJK-on en Honkongo. Bonvolu rakonti al mi viajn bonajn memorojn de la IJK.

B: Bonajn memorojn, malmultajn! Estas nur koŝmaro por mi. Ĉar organizado de Esperantaj eventoj por junuloj estas tre malfacilaj. Ĝi ne estas ia, ekzemple, politika movado, kaj ĝi ne estas vere

eduka movado. Oni ne ricevas subtenon de la registaro, aŭ lernejo, ktp. Kaj pro tio, la financa aspekto estis tre malfacila. Kaj, do, estas kelkaj aferoj oni devas samtempe fari, kiel, la edukado kaj la propagando samtempe, krom la organizado. Mi devis instrui Esperanton al multaj homoj kaj konvinki ilin ke ĝi estas vera lingvo. Mi devis propagandi en televido, en radio, kio estas Esperanto, kaj samtempe zorgi la internaciajn rilatojn kun UEA, TEJO, kaj ankaŭ Ĉinio. Rilato kun Ĉinio estas tre malfacila. Ĉar ili estas oficiistoj, ne ordinaraĵoj volontuloj kiel vi kaj mi. Ni havis tre malsaman senton kaj komprenon pri la Esperanta movado. Ili laboris. Kaj por ni, E-movado estas volontula laboro, ĉu ne? Tiam mi havis mian propran laboron en la kompanio, kaj kompreneble estas same kiel en Japanio. Se oni havus laboron en kompanio, oni preferinde ne zorgu pri eksterkompaniaj aferoj. Tio ne estas tiom dezirinda afero, ĉu ne, almenaŭ en Honkongo? Sed la kialo, kial mi faris tion kion mi faris estas ke, mi multe profitis el la sperto pri Esperanto, pri mia vojaĝo tra Eŭropo, kaj tra la mondo per Esperanto. Mia unua sperton de Esperanta aranĝo estas la Universala Kongreso en Seulo. Kaj post la kongreso ankaŭ tiu junulara kongreso en Ĉinan. Do, ĝi estas tre interesa afero. Mi estis tre inspirita kaj mi sentis ke Esperanto estis tre inspira afero. Kaj mi pensis tiam, ke ĉar mi tiom gajnis de la movado, mi devas iel kontribui. Mi okazigu IJK-on en mia hejmurbo. Sed fakte la tempo ne estis perfekta, mankis homoj, mankis mono, kaj mankis sperto ankaŭ miaflanke. Sed june kaj malsaĝe, mi faris ĝin. Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, ĝi sukcese finis. Tio estas la plej bona memoro: la fino! Dum la jaro antaŭ IJK mi havis ĉiutagan koŝmaron ke iel ĝi fiaskos aŭ mi bankruptos aŭ io katastrofa. Helpo vere tro mankis kaj la ŝarĝo tro peza. Sed ĝi finis, kaj eĉ du paroj geedziĝis, renkontinte en tiu IJK. Eble, mi tiel kontribuis?

J: Do, kio estas la plej grava por aranĝi IJK-on. Bonvolu simple esprimi per unu aŭ du vortoj.

B: Pasio!

J: Alia temo. En hodiaŭa via prelego vi diris, ke ne ismo, sed ago allogas homojn. Tio estas tre interesa por mi. Do, bonvolu rakonti al mi pri tia bona ago,

aŭ tiaj ĉarmaj homoj, kiujn vi renkontis en Esperantujo.

B: Jes. Troviĝas tre afablaj homoj, ja ja! Sed la Esperanta movado estas tre speciala movado. Ĉar ties enirejo ne havas ajnajn obstaklojn. Iu ajn povas eniri. Tio estas tre speciala. Kompreneble tio povus esti ankaŭ tre problema afero. Pligravas al mi, estas tamen ke ekzistas tiaj bonkoraj Esperantistoj, kiujn mi renkontis. Kiam mi komencis lerni Esperanton, mi estis vegetarano, tre aktiva por bestaj rajtoj, kaj ankaŭ medioprotektado ktp. Kiam mi renkontis grupon de Esperantistoj, kiuj tre aktive agadis ankaŭ por tiu ĉi fako, mi sentis, Ah! Jen veraj samideanoj. Iomete naive, mi pensis, ke ĉiuj Esperantistoj estu tiaj Esperantistoj. Sed vere je la komenco de tiuj jaroj, mi renkontis multajn idealistojn en la movado, kiuj multe inspiris min. Ili estis tiom sinceraj, aŭtentikaj homoj, kaj ankaŭ tre inteligentaj. Tio estas por mi tre rara kombino. Inteligentaj kaj bonkoraj.

J: Rara? Ĉu vere?

B: Do, ekzemple mi estas bonkora, sed ne tiom inteligenta! (Aŭ eble iu pensus renverse.) Sed ja estas problemo, ke inteligentaj homoj fojfoje ne estas tiom bonkoraj, kaj povas esti tre malagrablaj. Sed en la movado ne mankas tiaj bonkoraj kaj inteligentaj homoj. Do, mi pensas, ke en iu ajn movadoj estas la homoj kiuj allogas la homojn, ne vere la ideologio. Kompreneble la homaranismo, kaj la interna ideo, kaj tiaj aferoj estas la kerno de la movado. Sed por allogi komencantojn eble ne tiaj faktoroj. Anstataŭe eble estas belaj junulinoj, interesaj aranĝoj, afablaj kaj simpatiaj homoj.

J: Dankon. La lasta demando. Kian profiton Esperanto donas? Ĉi tiu demando troviĝis en via artikolo, mi denove demandas al vi. Bonvolu denove simple respondi.

B: Mi pensas, ke mi skribis, ke Esperanto estas malprofita afero (!). Ĉiam mi malprofitas finance! Sed mi supozas ke oni povas diri ekvilibance ke oni riĉiĝas spirite. Do, se oni multe utiligas pasportan servon, oni ŝparas monon dum la vojaĝo. Do eble ja ekzistas ia materiala gajno. Sed vere mi pensas, ke estas la kompreno pri diverseco kiu plej gravas - la amikeco kun eksterlandanoj. Tio estas tre bona.

La daŭrigo aperas en malsupro de la sekvanta paĝo...



Esperantoを学びはじめて
上智大学ドイツ語学科1年 杉本咲

私は週に一度、Esperanto語の授業に参加しています。授業と言っても堅苦しいものではなく、昼休みに十数人が集まり、先生（編集注：木村護郎）を囲んでご飯を食べながらEsperanto語を学ぼうというものです。そこでは基本的な文法を学び、例文を読んだりそれを活用して会話の練習をしたりしています。また、Esperantoの雑誌、様々なイベントの紹介や先生のパスポルタ・セルボでの体験談を話して下さるのも楽しみの一つとなっています。

ところで、先生がEsperanto語の授業をするから…と紹介されるまで、私は「Esperanto」という言葉すら全く聞いたことがありませんでした。世界共通語とされていながら認知度もあまり高くなく、Esperantistの数も100~200万人と少ない、むしろ現在の国際社会では英語の方が認知度も必要性もはるかに高いというのに、Esperanto語を学ぶ必要性自体、果たしてあるのだろうかと思っていました。しかし、特定の国や地域の言葉はないEsperanto語は、皆が同じスタートラインに立ちゼロから勉強を始めることで、言語の不平等やそれによるコミュニケーションの不平等をなくし、平等な世界を作ることを目指していると聞き、私はとても納得しました。英語が話せないと国際社会では通用しないとされている中で、私は苦勞して英語を勉強しているのに、英語が母語の人々は得だよなぁと時折思っていた私は、このEsperantoの理念にとっても惹かれました。

さらに、先生が授業に使うと提示なさったEsperantoの教科書が、たった30ページほどしかない薄い小冊子だったので、新しい言語に挑戦するにはちょうどいいかもと軽い気持ちで興味を持ち始めました。そんな薄っぺらな冊子に基本的な文法事項がすべて載っているなんて到底信じられませんでした。Esperanto語には例外が少なく、習得すると自分の中で文法を整理しやすくなり、他言語の学習がしやすくなると聞き、ならば勉強してみようと思ったのです。正直に言えば、私は大学でドイツ語を専攻しているので、「Esperanto語を習得したい」というよりは、「Esperanto語を習得することで、少しでもドイツ語の学習に役立てば…」という気持ちでした。

勉強し始めて4カ月ほど、まだ話すこともままならないですが、単純明快な文法のおかげで、言語を学ぶこと、理解することの楽しさを感じています。今後も継続して学習し、一人のEsperantistとなって平等な世界をつくっていく一員になれたらと思っています。

Ĉar la reto de homoj estas ĉiam tre specialaj. Esperantistoj, ekzemple, en Japanio, havas tre interesajn vivojn, aŭ vivstilojn ktp. Sen Esperanto, oni ne povas havi tiom da veraj kontaktoj kun tiom da diversaj, (aŭ strangaj fojfoje) homoj. Eble ankaŭ mi apartenas al tiuj strangaj homoj kaj pro tio mi ŝatas konatiĝi ankaŭ kun aliaj strangaj homoj. Estas vere tre speciala, ĉar mi laboras en universitato kaj ĉiam mi havas kontakton nur kun akademianoj. Ekster universitato tre malofte mi havas tian eblecon.

J: Ĉu vi havas demandon? (Al s-ro Hujimori kiu estis fotisto de la intervjuo) Li estas vera junulo, 25 jara.

B: Por ĉinoj, do, tiuj kiuj sub kvardek jara estas junuloj. Pro tio ni ambaŭ (B kaj J) estas junuloj!

H: Kian malfacilaĝon vi havis en IJK.

B: Ĉu vi intencas okazigi IJK-on en Japanio?

H: Iomete...

B: Do vi devas havi pasion, ne nur iomete. Vi devas havi iomege da pasio! Kiel nia antaŭa prelegantino tre prave diris: Kie estas volo, tie estas vojo! (La prelegantino estis s-rino Fan Ĉu Ĵu. Ŝi ankaŭ prelegis en la kongreso, kaj diris tiel.)

J: Mi kore dankas vin pro via afableco malgraŭ via okupiteco.

B: Dankon.
(fino)

Pri s-ro Bill Mak: S-ro Bill Mak naskiĝinta en 1973 en Honkongo memlernis Esperanton en 1993 kaj poste en 2000 laboris kiel LKK-prezidanto okaze de la Internacia Junulara Kongreso en sia hejmurbo. En 1996 li diplomiĝis pri lingvistiko kaj sanskrito ĉe McGill-universitato, Montrealo, Kanado, en 2009 doktoriĝis pri budhologiaj tekstoj ĉe Pekina Universitato, kaj nun li faras esploron pri Indologia studo ĉe kurso pri diplomitoj de la universitato Kioto.

Vendejo de Frostigitaj Manĝaĵoj de Kato

ተገቢ ልሳሳ ልሳሳ

『ねこのれいとう食品店』の最終話。自室に帰りれいとう食品を解凍してみると湯気に囲まれ、子供時代に戻ってしまいます。飼っていた猫のタケとキチにやってきた青井さんの回りには友達が集まってきました。



Kiam ĉiuj kuŝiĝis surdorse en la bazejo, s-ro Aoi subite rememoris ion.

"Ah, mi devas pardonpeti de Teĉĉjo. Jen kiam ni iris al kampado en la tria lernoĵaro, estis mi, kiu enmetis ranon en la dormosakon. Kaj en la kvara lernoĵaro, rompita mi la argilan kreaĵon de Juĉjo. Mi nur tuŝetis ĝin ĉar ĝi estis tiel bone farita ... Kaj, kaj ...Pardonu!"

S-ro Aoi sinsekve rememoris siajn bubajon, aventuron, malsukceson kaj ĝojon aŭ malĝojon. Ĉu tio estis kaŭzo de ĉielo tro blua? S-ro Aoi ne vidis longtempe tian bluan ĉielon, kvazaŭ oni eblas flugi foren en ĝi. La kamparo, kie la blankaj nuboj plenplenas, la cikadoj bruas kaj vespere la ranoj kantegas. La somero, kiun li amas, estas bruega, sed malsama ol la sonoj de laŭtparolilo, aŭto aŭ trajno en urbo. Kaj kamparo estas plena de insektoj, folioj kaj floroj. Kiam vesperiĝas, korvoj amase

grakas kaj revenas al arbaro. En bela vesperruĝo vizaĝoj, manoj, nudaj piedoj kaj ĉiuj en ĉirkaŭo iĝas ruĝaj. "Revenu hejmen kiam ranoj kvakas!"

Ĉu li jam baldaŭ endormiĝis rememorante diversajn aferojn? Troviĝas vere ruĝa vesperruĝo. Ĉiuj revenis hejmen. Ĉio estas kiel antaŭe. Ĉirkaŭe nebuliĝis kaj nebuliĝis.

S-ro Aoi sola staris kaj ne klare sciis, ĉu li vere estas infano aŭ jam plenaĝulo.

Kiam la kato Take blekis "Miaŭ", s-ro Aoi reprenis sian konscion. Li estas denove en sia apartamento. Vaporo de la frostigita manĝaĵo iom post iom malaperis.

"Nu! Mi verku tiaman aferon!"

S-ro Aoi sentis, ke ĉifoje li povas verki majstran fabelon. Jen li nun rimarkis, ke rembunita pupo de kato en la vendejo de frostigitaj manĝaĵoj ĝuste similas al Take.

"Se mi finos verki 'Memoraĵo', sekve mi verkos 'Estonteco'.

Poste 'Kosmo', kaj ankaŭ volas verki 'Kamarado' ..."

S-ro Aoi intencas skribi leteron al sia patrino.

"Ankoraŭfoje mi provos verki. Tial mi volas baldaŭ reveni al la hejmloko".



Fino.

Vortoj

kamp-ad-o: キャンプ
argil-a: ねんどの
kre-aĵ-o: 工作
bub-aĵ-o: いたずら
blu-a: 青い

bru-a: うるさい
cikad-o: せみ
laŭt-parol-il-o: スピーカー
korv-o: カラス
grak-i: (ガーガーと)鳴く

nebul-iĝ-i: もやがかか
kvak-i: (クワット)鳴く
blek-i: (ゆっくりと)鳴く
Kamarad-o: なかま

第29回日韓中越青年エスペラント合宿(La 29a Komuna Seminario)

Provizora programo de la 29a KS (kontribuo pri programo estas bonvena!)		
Dato	Tempo	Agadoj
18.12.2010	14h00 - 16h00	Akceptado kaj informado
	16h15 - 17h15	(plenigota)
	18h - 19h30	Vespermanĝo
	20h - 23h	Interkona vespero
19.12.2010	7h30 - 8h30	Matenmanĝo
	9h - 10h	Inaŭgura Malfermo
	10h - 11h	Renkontiĝo inter VUAO (Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj), VEA (Vjetnama Esperanta Asocio) kaj KS-aj partoprenantoj
	11h30 - 12h30	Tagmanĝo
	13h30 - 15h	Diskutado pri la ĉefa temo de 29a KS "Komunikiloj inter junaj esperantistoj"
	15h15 - 17h30	Samtempaj agadoj: <ul style="list-style-type: none"> • Klaso de la Vjetnama lingvo • Klaso de Esperanto por komencantoj • Klaso de japana "origami" (paperfaldado) • Klaso pri vjetnamaj kantoj • Klaso de klubo Yumeiho - kiel zorgi la sanon (senmedikamenta resaniga metodo laŭ Vjetnama tradicia sperto)
	18h - 19h30	Vespermanĝo
	20h - 23h	<ul style="list-style-type: none"> • Viziti noktan bazaron kaj malnova kvartalo de Hanojo en centra urbo. • Vizitado al Akvopupa teatro
20.12.2010	7h30 - 8h30	Matenmanĝo
	9h - 12h	Ekskursoj al la maŭzoleo de Ho Chi Minh, kaj templo pri literaturo kaj nacia etno-muzeo kun ekster-agadoj.
	12h30 - 13h30	Tagmanĝo
	14h - 15h30	Inaŭgura Fermo
	16h - 17h	Ĝis revido

テーマ

"Komunikiloj inter junaj esperantistoj"

(青年エスペランティストの交流法)

日程

2010年12月18日(土)～20日(月)

場所

la Amikeca Domo de VUAO (Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj)

連絡すれば、空港まで迎えに来てくれるかもしれません。

費用 (ベトナムドン)

日本、韓国、その他の国 2,500,000

中国、日本と韓国の学生 2,300,000

ベトナムと南アジアの国 2,000,000

※この料金は食事と2晩の宿と観光を含む。

参加申し込み・連絡先

直接の申し込みにはエスペラントを使う必要があります。 <http://www.tejo.org/eo/KS2010>に申し込み用文書(ワード形式)があります。

よく分からない方やエスペラントによる交渉に自信のない方はとりあえず電子メールでJEJの役員宛: jej_kontakt@yahoo.com.jp にご連絡下さい。

Temo

"Komunikiloj inter junaj esperantistoj"

Dato

de la 18a ĝis la 20a de decembro, 2010

Ejo

la Amikeca Domo de VUAO (Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj)

Se vi komunikus al respondeculoj de la KS, ili eble kaptus vin en flughaveno.

Kotizo

Japanio, koreio kaj aliaj landoj 2,500,000VND

Ĉinio, studentoj de Japanio kaj Koreio 2,300,000VND

Vjetnamio kaj Sud-aziaj landoj 2,000,000VND

*La kotizo inkluzivas manĝadon kaj loĝadon por 2 noktoj kaj turismoj.

Aliĝo

En "<http://www.tejo.org/eo/KS2010>" troviĝas provizora enhavo kaj aliĝilo (microsoft-word-dosiero). Se vi ne komprenas tion, antaŭ ĉio sendu retmesaĝon al jena adreso: jej_kontakt@yahoo.com.jp

表紙写真は岩間響さんがキューバのIJKで撮ったもの。

La kovrila fotoĵo estas en Kubo ĉe IJK fare de s-ro IWAMA Kyo.